# HEJS

1.979

## INFORMILO POR GEJUNULOJ, MEMBROJ DE H.E.F.

**HEJS, Junulara Sekcio de H.E.F.**

Pere de nur kelkaj vortoj ni malfermas ĉi informilon, ĉar certe la junulara sekcio de H.E.F. ne - necesas prezenton post 15 jaroj da efika agado, tamen pro la lasta junulara krizo kaj konsekvence la ne publikigo de ĝia organo HEJS-Bulteno, nia Redakcio ŝarĝigos ĉi-spacon kun la celo informi la HEJS geanoj (H.E.F. geanoj kiuj ankoraŭ ne atingis 25 - jarojn) pri la lastaj paŝoj de nova HEJS estraro, Internaciaj Junularaj Kunvenoj kaj Kongresoj, TEJO, k.t.p.

Tiel do, se iu spontanea kunlaboranto deziras helpi la Redakcion en tiu ĉi nova tasko ni akceptos -- tre volonte lian kunlaboradon.

H E J S-Fondinto
S. Aragay

-.-.-.-.-.-.-

La jena informilo, senpaga por ĉiu gejunulo kiu kotizas al H.E.F. 500 p-toj kun la rajto ricevi unu ekzempleron de la oficiala organo de H.E.F. BOLETIN aperos, laŭ bezone, kaj ĝi enhavos temojn kaj informojn kiuj interesas al la juna esperantisto.

-.-.-.-.-.-.-.-

La provizora adreso de H.E.J.S. (Hispana Esperanto Junulara Sekcio) estas la sama de Hispana Esperanto Federacio.

-.-.-.-.-.-.-.-

Se vi deziras malnovajn numerojn de H.E.J.S. Bulteno eldonitaj en Sabadell petu al ni, sendante neuzitajn poŝtmarkojn, kies valoro estu 10 p-toj.

Ankaŭ ni havas je via dispono algluebla afiŝetoj kun la teksto "ESPERANTO IDIOMA UNIVERSAL", prezo 10 p-toj unu ekzemplero. Rabato por mendo de pli ol 10 ekzempleroj.

## 35-a I.J.K. en Aŭsterlitz

Dum la semajno 20-a kaj 27-a de Julio 1.979, okazis en Aŭsterlitz (Nederlando) la 35-a I.J.K. kun -- ĉeesto de 320 gepartoprenintoj el dudeko da landoj.

- Pri la temo "Interŝtataj unuiĝoj - kiucele?" prelegis: D-ro Humprey Tonkin, Prezidanto de U.E.A; S-in Akiko Woessink-Nagata, Redaktorino de UN kaj Ni"; S-ro John Catlinĉ, ĉefadministranto de la Ekonomia kaj Socia Komitato de la E.K.; S-ro Peter Kuenstler junulara kunordiĝa oficiejo por la Unuiĝintaj Nacioj en Genevo; kaj S-ro Richard Corbett, Generala Sekretario de la Eŭropa Kunordiga Buroo por internaciaj junularaj organizoj.

- La du laste menciitaj prelegantoj alparolis la kongresanojn nacilingve. Tiel rezultis fenomeno kiu devu esti superflua en Esperanto-Kongreso: Tradukado. Malfacilaĵon tion prizorgi, tamen, multe pli ol kompensis la aparta sperteco kaj prestiĝo de tiuj prelegantoj.

Krome ses laborgrupoj funkciis kadre de la Kongresa temo: Pri la Eŭropa, la nordlanda kaj la helena unuiĝon; pri la sekvoj de la Fina Akto de Helsinki; pri hommediaj problemoj translimaj kaj pri la maldecidindaj aspektoj de unuiĝo. La kutimaj distraj eroj ne mankis, naskiĝis eĉ pluraj novaj, por liveri senprecedence plenan programon al la kongresanoj.

La komitato de TEJO kunsidis kvin-foje kaj elektis novan estraron por gvidi la Organizon tra la sekventaj du jaroj.

Prezidanto: Stefan MacGill, Nederlando
Vicprezidanto: Bruĉjo Kasini, Italio
Vicprezidanto: Csaba Lendvay, Hungario.
Generala Sekretario: Thomas Bormann, FR Germanio

La Komitato elektis per aplaŭdo la pasintan Prezidanton D-ro Savas Tsiturides, Greklando, Honoran Prezidanton.

( Laŭ la Informa Servo de TEJO).





**Adreso: 36a IJK, Anundilankatu 3, SF-26100 Rauma 10, Finnlando.**

Trans la Balta Maro, trans arkipelago unika en Eŭropo situas la Sudokcidenta Finnlando. Verŝajne vi venos per ŝipo. Plej unue vi rimarkos la kriantajn mevojn; vi vidas nudan, grizan rokinsuleton — vi alvenis al Finnlando. Iom post iom la rokoj iĝas pli grandaj, multiĝas, fariĝas verda insularo. Poste, dum aŭtobusa veturo el Turku al Rauma, vi vidas alian parton de la varia pejzaĝo de Finnlando: la plej malnovan kultur-regionon de la lando.

Rauma (prononcu "raŭma"), la loko de la 36a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, estas urbeto kun ĉirkaŭ 30 000 loĝantoj. Ĝi zorge kulturas siajn tradiciojn: la renomon de marista urbo, la malnovan centron kun ligna domaro, la interesan dialekton, naskintan eĉ iom da propra literaturo, kaj la tradicion de puntofarado. Samtempe kun nia kongreso Rauma festos sian ĉiujaran puntosemajnon, kaj ankaŭ la kongresa temo ligiĝos al la rolo de la popola kultura tradicio en la nuna mondo. Tiucele Finnlanda Esperantista Junulara Organizo aranĝos la kongreson kunlabore kun Finna Junulara Asocio, organizaĵo kun pli ol 100 000 membroj aktivantaj en diversaj kulturaj ŝatokupoj.




Kiel la kongresejo funkcios la modernaj konstruaĵoj de la urbaj civitana instituto kaj lernejoj. La dormejoj estos de la amasloĝeja tipo, sed por tiuj, kiuj postulas iom pli da komforto, la Landa Kongresa Komitato peras rezervojn por someraj hoteloj. Bonvolu noti, ke la nombro de hotelĉambroj estas limigita.



Zorga preparado de la distraj, kulturaj kaj laboraj programeroj jam komenciĝis. Kun la tuttaga ekskurso, variaj vesperaj aranĝoj ktp., la programo sekvos la ĝeneralan skemon de Internaciaj Junularaj Kongresoj, sed ia speciala finna kaj norda karaktero nuancos la internaciecon.

Venu do konstati, ke ankaŭ en la nordo ekzistas somero! Pensu pri la proksimeco de Stokholmo, la urbo de la tuj-posta Universala Kongreso: ni kolektos en IJK grupon por ricevi rabaton en la ŝipvojaĝo de Turku ĝis Stokholmo. La ŝipkompanioj donas konsiderindan rabaton ankaŭ al la junuloj, kiuj veturas per la trajnkarto "Inter-Rail". La ŝipoj estas grandaj kaj modernaj — fakte, multaj finnoj kaj svedoj veturas en ili nur por ferii surmare.

La kotizojn kaj konsilojn por aliĝo vi trovos sur aparte presita aliĝilo. Post unu/du monatoj atendeblas pli ampleksa informilo pri la preparlaboroj de la kongreso. Regule legu ankaŭ la koncernajn informojn en *Esperanto* (TEJO-paĝo), *Koncize* kaj *Kontakto*. Via aliĝo estas jam nun bonvena. Ĝis la!



INFORMO, PREZENTITA DE LA EKS-PREZIDANTO DE HEJS S-ro Ludoviko de Yzaguerre dum la 39-a Hispana E. Kongreso

Mi, nome de la estraro intencas bilanci tiujn pli ol du jarojn da estrado kaj prezenti la nunan situacion de H.E.J.S, pere de tiu-ĉi cirkulero, kiun ricevas la nunaj aktivaj membroj kaj junularaj grupoj en Hispanio, kiel ankaŭ TEJO kaj H.E.F.

Ni povas aserti ke HEJS trapasas, de post pli ol tri jaroj, krizan epokon. Ĉiaj bazaj homaj fortoj malaperis eble la nova situacio en nia lando kaŭzis, ke homoj pli interesiĝas pri politiko, pri retoriko, pri erotiko, ol pli Esperanto; ne gravas la kaŭzo des la fakto, ke HEJS estas senbaza. Kiam ni, antaŭ du jaroj kaj kvarono estis devigitaj alpreni la estrajn taskojn por ke HEJS ne malaperu (do, jam tiam HEJS travivis la krizon) ni eklaboris, laŭ la supozo ke ĝia tiama bazo estas pli ol ducent homoj envicigitaj en listo sendita al ni de la antaŭa estraro. . . . . . . . . . . .

Sed la faktoj klopodis pruvi ke plejmulto da homoj en tiu listo estis fantomoj, ĉar malgraŭ tio, ke ni daŭre sendadis al ili la bultenon, iliaj kotizoj atingis nek nin, ken la iam ekzistantajn delegitojn, nek la antaŭan estraron. Ĉar bonaj belaj vortoj ne efikis, la ekonomie endanĝeriĝis pro tiuj elspezoj ne pagitaj, kaj ni decidis sendi la 1977-an kotizojn kontraŭpage, kiel ankaŭ tiun por 1978. Bedaŭrinde, tiuj agoj preskaŭ ne rezultis. Sed ni obstinis en la kredo ke temis pri teknika probleme, aŭ simila, sed "ja tiuj pli ol ducent estas esperantistoj! Eble ili ne komprenas esperanton", kaj en la monato novembro de 1978 ni sendis Cirkuleron kaj en esperanto kaj en kastilia lingvo. La fina konkludo el ĉiuj ĉi-tiuj agoj, post nia elreviĝo, estas ke tiu komenca listo estis fantoma, ke nuntempe nur kvardek personoj estas membroj (ne ĉar ili pagis por 1979, sed por 1978). Tiujn homojn, kiuj neniam pagis, eĉ ne por 1977, ni eksigis el HEJS, kaj al tiuj, kiuj ne pagis por 1978, ni faris lastan averton, ke ili pagu kiel eble plej rapide.

Facile videblas, ke la du ĉefaj fortoj, kiuj devus

temi la Asocion, mankas al ni: Mono kaj membroj aktivaj. Tiuj du mankoj jam havis sekvojn: Pro la fakto ke ĝi devis fari sian laboron sub gravaj ekonomiaj limigoj, kaj ke ĝi ricevis ege malmultajn kunlaborojn, la redakcio de nia bultene, ĉefita de Oscar Puig, demisiis. Ne estas, do, troigo la aserto, ke la Asocio restas nur estraro kun kelkdeke da disserigitaj membroj.

. . .

Se en la estonta aro da kuraĝuloj volas ŝarĝi siajn ŝultrojn per HEJS ni, flankenlasante nian pesimismon kaj seniluziiĝon, konsilus al ili ĝisfunde studi la objektivajn faktorojn kiuj ŝvebas super la Junulara Esperanto Movado ĉe ni. Oni devus rekonsideri la rilatoj inter HEJS kaj HEF (bonus, ekzemple, ke ĉiuj junaj membroj de la Federacio aŭtomate iĝus membroj de HEJS sen ia ajn krompago), sed ni ne eksolvu nun ĉion. Ni lasas niajn spertojn por ke iam iu ilin uzu.

-.-.-.-.-.-.-.-.-

KONTAKTO

Trimonata Revuo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) . Abono (sen membreco) kostas 450 pesetojn.

Gejunuloj ĝis inkluzive 25 jaroj (individua membro de U.E.A.) pagante 600 pesetojn rajtas ricevi la jarlibron de UEA kaj la revuon KONTAKTO.

Pagante 1.500 pesetojn rajtas ricevi krom tio jam menciita, la Revuon "Esperanto".

Specimenajn ekzemplerojn kaj pagojn:

JUAN AZCUENAGA VIERNA
Capitán Palacios 3-4º N
SANTANDER